

## Enhavo

1	Gratuloj .....	2
1.1	Humphrey Tonkin – 70-jara .....	2
1.2	Honora doktoreco por Aleksandr Duličenko.....	2
2	El universitatoj .....	2
2.1	Interlingvistika sesio en Poznano ( <i>Ilona Koutny</i> ).....	2
2.2	Laboratorio “Interlingvistiko por Filozofoj” ( <i>Federico Gobbo</i> ) .....	3
3	Aranĝoj.....	3
3.1	La vivoverko de István Szerdahelyi estas ankaŭ nun valida ( <i>Ilona Koutny</i> ).....	3
3.2	Interlingvistika konferenco en Tartu .....	4
3.3	La 19-a konferenco de GIL pri la rolo de elstaraj personoj.....	5
4	Bibliografioj kaj bibliotekoj .....	6
4.1	Elekta bibliografio pri Zamenhof ( <i>Humphrey Tonkin</i> ). .....	6
4.2	Aktoj de la kolokvo pri bibliotekoj kaj arkivoj (Vieno 2007) .....	13
4.3	Esperanto-materialoj en British Library .....	14
4.4	Libroj ĉe Google .....	14
4.5	Worldcat – bibliografia serĉmaŝino.....	14
4.6	Kelkaj novaj interlingvistikaj verkoj de LIU Haitao.....	14
5	Leksikografio en la reto ( <i>Miroslav Malovec</i> ) .....	15
6	Revuoj.....	18
6.1	“Language Problems & Language Planning” 3/2008.....	18
6.2	“Language Problems & Language Planning” 1-2/2009.....	18
6.3	De LMLP al LPLP – Pri evoluo de revuo .....	20
6.4	“Esperantologio – Esperanto Studies” (EES), Kajero 4 (2009) .....	22
6.5	Nova revuo pri eŭropa lingvo-politiko .....	22
6.6	La esperantologia reta revuo “Lingva Kritiko” .....	23
7	Pri la projekto KOD ( <i>Rudolf-Josef Fischer</i> ).....	24
8	Romaa gramatiko de Nikola Rašić aperis en Zagreb .....	26
9	Conlang kaj Conlang-Konferencoj.....	27
9.1	Pri Conlang ĝenerale.....	27
9.2	Conlang-Konferencoj.....	28
10	Pri planlingvoj en germanaj lingvistikaj libroj .....	30
11	Novaj libroj pri lingvopolitiko .....	30
12	Novaj interlingvistikaj libroj.....	33
13	Japana enkonduka verko pri interlingvistiko ( <i>KIMURA Goro</i> ) .....	39
14	ESF nomumis novajn direktorojn .....	40

# 1 Gratuloj

## 1.1 Humphrey Tonkin – 70-jara

La 2-an de decembro 2009 prof. d-ro Humphrey Tonkin festis sian 70-an naskiĝtagon. La jubileulo povas retrorigardi al granda kaj multflanka vivoverko kiel literatursciencisto, lingvopolitikisto, edukisto, sciencorganizanto, universitata profesoro kaj rektoro, sed ne laste ankaŭ kiel interlingvisto, esperantologo kaj esperanto-movada organizanto. Li tamen ne nur povas retrorigardi al impona verko. Humphrey Tonkin estas daŭre mirinde aktiva. Ni multon dankas al unu el la ĉefaj intelektuloj kaj organizantoj de la Esperanto-komunumo dum la lastaj jardekoj.

La 9-an de januaro 2010, en la Centra Oficejo de UEA okazos festa aranĝo honore al la jubileulo. Oni solene transdonos al li 900-paĝan festlibron kun kontribuoj de pli ol 100 fakuloj kaj amikoj. Jen la titolo:

***Blanke, Detlev, Ulrich Lins (red.): La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 901 p. ISBN 9789290171133***

Ni sincere kaj amike gratulas al la jubileulo kaj deziras al li – kaj al ni – ankoraŭ multajn komunajn jarojn da plena aktivado kaj fruktodona kunlaboro.

En IpI 72 (1/2010) ni detale prezentos la solenan aranĝon kaj la festlibron.

Red.

## 1.2 Honora doktoreco por Aleksandr Duliĉenko

La Universitato de Trier (suda Germanio) la 28-an de majo 2009 distingis la konatan lingviston kaj interlingviston d-ron Aleksandr Duliĉenko, profesoro ĉe la universitato Tartu/ Estonio per honora doktoreco. En neinterlingvistikaj medioj la distingito aparte konatiĝis pro siaj esploroj pri malgrandaj slavaj lingvoj. Ni gratulas al la honora doktoro.

# 2 El universitatoj

## 2.1 Interlingvistika sesio en Poznano

Ora pola aŭtuno akceptis la partoprenantojn de la ĉi-jara **interlingvistika sesio** kaj de la **instruista trejnado** en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM), Poznano meze de septembro 2009. La 3-a semestro de la trijara studado ofertis - ankaŭ ĉi-foje - interesan programon kun elstaraj prelegantoj: pri interlingvistiko *d-rino Věra Barandovská-Frank*, pri esperanta literaturo *István Ertl*, pri esperanta gramatiko *Probal Dasgupta*, pri ĝenerala lingvistiko *Michael Farris*. Prof. Dasgupta ankaŭ renkontiĝis kun aliaj kolegoj en la Lingvistika Instituto de UAM.

La unua sesio de la unujara instruista trejnado (komuna entrepreno de UAM kaj ILEI kunlabore kun Edukado.net) okazis paralele, - sed ebligis parte sperti la suprajn kursojn, sub la sindediĉa gvido de *Katalin Kovats* kun la kontribuo de *Ilona Koutny*. Naŭ partoprenantoj el 8 landoj estis inicataj al la praktiko de instruista profesio. Ili povis konsulti abundan instrumaterialon kaj provi la teknikojn.

La lastan tagon okazis la novtipa KER-ekzameno, al kiu aliĝis 10 personoj (5 el la instruista trejngrupo).

Merkrede la fervojista domo donis lokon al la kutima komuna vespero de studantoj, studintoj, prelegantoj kaj lokaj esperantistoj por komuna amuziĝo.

La kultura aranĝo **Arkones**, ĉi-foje jubilea, la 25-a (18-20.09) semajnfine atendis la interesiĝantojn kun abunda programo de la subjektiva prelego de la prezidanto de UEA,

Probal Dasgupta (Esperanto, Barato kaj UEA) tra la muzikaj prezentadoj de la tradicia mielvespero ĝis teatraj prezentadoj (Jalta Esperanto-teatro, Zamenhof-prezentoj de *M. Miglucci*, de *G. Handzlik*). Okazis prelegoj pri UEA kaj Unesko (*Barbara Pietrzak*), pri Lidia Zamenhof, Andreo Cseh (*Katalin Kovats*) kaj Istvan Szerdahelyi (*Ilona Koutny*), kiuj kompletigis la programon de la universitata sesio. La kunordigo de diversaj entreprenoj pruviĝis sukcesa.

*Ilona Koutny*

(Ankaŭ vidu: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>)

## 2.2 Laboratorio "Interlingvistiko por Filozofoj"

Lige al la katedro de *prof. Paolo Valore* "Historio de nuntempa metafiziko", de la Universitato de Milano, *Federico Gobbo* okazigas "laboratorion 'interlingvistiko por filozofoj'". La laboratorio prezentas la historian kaj filozofian bazojn de interlingvistiko kaj la konivan kaj lingvistikan aspektojn de esperantologio.

En la **interlingvistika parto** oni prezentos la ĉefajn konceptojn de lingvoplanado, kiuj estos aplikataj al la studo de internaciaj planlingvoj, kiel ekzemple la rilato identeco-lingvo, la statuso- kaj korpuso-planado, kaj la iloj uzataj de lingvopolitiko, kun speciala atento al Eŭropa Unio. Krome, oni klarigos la ĉefajn ŝtupojn de la esplorado pri la internacia planlingva projektado de la deksepa jarcento (la "characteristica universalis" kaj la "lingua generalis" de Leibniz kaj la letero de Descartes al Mersenne) ĝis la dudeka (la influo de la Sapir-Whorf-a hipotezo je Interlingua, sponsorita de IALA).

En la **esperantologia parto** oni rekte instruos Esperanton per enlingva dialog-metodo, klarigante la rilatojn kun ĝiaj ĉefaj fontolingvoj (franca, angla, germana, latina, helena, rusa, pola). Apartan atenton oni donos al la lingvoplanadaj elektoj de L.L. Zamenhof pri la strukturo de la lingvo.

La laboratorio antaŭvidas diskutvekan momenton inter la partoprenantoj pri interlingvistikaj temoj per la uzo de dialogaj mapoj, dum la lernado de la esperantologia bazo okazos ĉefe en la lingvo mem, tiel, ke fine de la laboratorio la partoprenantoj povas pluperfektigi la regadon de la lingvo aŭtonome kaj senpene. Itallingvaj informoj troviĝas ĉe <http://pvalore.yolasite.com/laboratorio.php>.

*Federico Gobbo*

## 3 Aranĝoj

### 3.1 La vivoverko de István Szerdahelyi estas ankaŭ nun valida

*Prof. István Szerdahelyi* (1924-1987) estas konata kiel la fondinto de la unika Esperanto-fako de la budapeŝta Universitato Eötvös, kiel diligenta interlingvisto, kiel esperantologo, kiu en multaj artikoloj provis science priskribi Esperanton, kiel entuziasma pledanto por la lerneja instruado de Esperanto. En la okuloj de siaj gestudentoj li estis denaska instruisto, kiu kapablis prezenti seriozan materialon en amuza formo. Antaŭ sia morto li iĝis membro de AdE malgraŭ la pli fruaj konfliktoj pri la radikarkaractero. Li prezidis ILEI kaj fariĝis honora membro de UEA.

Okazis prelego pri li dum la ILEI-konferenco 2009. Dum la 94-a UK en Bjalistoko okazis mallonga simpozio (sub la auspicio de AdE kaj CED), dediĉita al István Szerdahelyi. Prezenti lin kaj lanĉis la libron **Abunda fonto** omaĝe al li *Ilona Koutny*, iama studentino kaj lia posteulo en ELTE dum jardeko.

Liajn – daŭre aktualajn – temojn traktis liaj iamaj gestudentoj kaj kolegoj, kiujn li iel influis: *Probal Dasgupta* analizis la morfeman sistemon de esperanto; *Renato Corsetti* la propedeŭtikan valoron de esperanto de Szerdahelyi ĝis Springboard. *Zsófia Kóródy* prezentis la provojn de Szerdahelyi enkonduki e-on enkadre de instruado de fremdaj lingvoj; *István Ertl* specifajn aspektojn de tradukado el kaj al Esperanto. La specifajojn de la esperanta leksikografio kaj uzon de komputiloj en leksikografio skizis *Ilona Koutny*, kiu gvidis la programon.

Tuttaga memorfesto dediĉita al prof. Szerdahelyi sekvis en Budapeŝto la 30-an de aŭgusto 2009 kun partopreno de lia familio (edzino, du filoj, 5 nepoj). Enkondukis la memortagon *Imre Szabó*, prezidanto de HEA, rememorigis pri la meritoj de Szerdahelyi la nova ILEI-prezidanto, *Stefan MacGill* kaj transdonis salutojn *Zlatko Tisljar*, kiu poste prezentis filmitan intervjuon kun la festato.

Post la prezento de vivo kaj verko de prof. Szerdahelyi far Ilona Koutny kaj transdono de la memolibro, prelegis iamaj hungaraj kolegoj kaj studentoj: *Blazio Vaha* pri gramatikaj temoj de Szerdahelyi, *Árpád Rátkai* skizis la vojon de Zamenhof ĝis Szerdahelyi, *György Nanovfszky* traktis lingvopolitikon, *Márta Kovács* la novajn lingvoekzamenojn, *Zsófia Kóródy* kaj *István Ertl*. Kvankam lia granda atingo, la Esperanto-fako de ELTE ĵus finis sian agadon, liaj disĉiploj plu agas kaj la scienca aliro al Esperanto, por kiu li pledis, daŭre trovas apogantojn. Liaj ideoj ankaŭ nun estas vivantaj (el La Ondo 2009/10).

*Ilona Koutny*

### 3.2 Interlingvistika konferenco en Tartu

De 25.–26.09.2009 en la salono de la Urbodomo de Tartu, Estonio, okazis la internacia konferenco “Internaciaj lingvoj en kunteksto de eŭrolingvistiko kaj interlingvistiko”. Partoprenis lingvistoj kaj gastoj el Estonio, Litovio, Luksemburgio kaj Rusio. Siajn studojn sendis ankaŭ lingvistoj el Germanio, Italio kaj Svislando.

La konferenco estis dediĉita al la 150-a naskiĝdatreveno de Lazar Ludwik Zamenhof kaj al la 95-jariĝo de Tartua Esperanto-Societo.

Jam dum la unua tago de la konferenco aperis la 9-a volumo de la konata serio “*Interlinguistica Tartuensis*” (256 p, redaktis Aleksandr D. Duliĉenko, Sergei N. Kuznecov, Madis Linnamägi, Enn Ernits). La konferencajn studojn eldonis la katedro pri slava filologio de Tartua Universitato, Internacia Interlingvistika Asocio kaj Estona Interlingvistika Asocio. La studoj kolektiĝas en kvar subtemoj:

- (a) Teoriaj kaj historiaj aspektoj de socilingvistiko kaj interlingvistiko:  
*Aleksandr D. Duliĉenko*;
- (b) Interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko:  
*Detlev Blanke, Aleksandr D. Duliĉenko, Sabine Fiedler, Věra Barandovská-Frank*;
- (c) Socilingvistikaj aspektoj de esperantologio:  
*Aloyzas Gudavičius, Aleksandr Melnikov, Antonio Codazzi, Renato Corsetti, Anna Lowenstein, Brian R. Moon, Oksana Burkina*;
- (d) La Tartu-Moskva skolo kaj problemoj de la historio de interlingvistiko:  
*Enn Ernits, Madis Linnamägi, Andreas Künzli, Sergej Kuznecov*.

Pri la enhavo de la antologio vidu la paĝojn 37/38 en ĉi tiu kajero.

Dum la konferenco estis proklamitaj novaj laŭreatoj de la **internacia honorpremio Academicus Ariste**. Ĝin ricevis

- a) pro interlingvistikaj meritoj: *prof. Aloyzas Gudavičius* (Šiauliai, Litovio) kaj *prof. Aleksandr Melnikov* (Rostov-na-Donu, Rusio)
- b) pro demokratia lingvokomunikado (PAX LINGUARUM): *Brian R. Moon* (Luksemburgio).

Kiam okazis aranĝoj okaze de la 100-a naskiĝdatreveno de akademiano Paul Ariste (1905–1990), membro de la Komitato de Honoraj Patronoj ĉe UEA en 1984–1990, laŭreatoj de la jaro 2005 estis jenaj personoj:

*d-ro Detlev Blanke* (Berlin, Germanio), *prof Michel Duc Goninaz* (Aix-en-Provence, Francio), *prof. d-ro Aleksandr D. Duliĉenko* (Tartu, Estonio), *prof. d-ro Helmar Frank* (Paderborn, Germanio), *prof. d-ro Sergei Kuznecov* (Moskva, Rusio), *prof. d-ro Humphrey Tonkin* (Hartford, Usono).

La studoj kaj diskutoj de la konferenco plejparte tuŝis sciencistojn el Estonio, konatajn ankaŭ kiel interlingvistoj. Ili estis ne nur eminentaj fakuloj pri unu sola disciplino, sed ankaŭ kompetentis pri la evoluo de aliaj sciencoj. Inter ili estas Wilhelm Ostwald (kemiisto), *Jaan Sarv* (matematikisto), *Edgar von Wahl* (matematikisto) kaj **Jakob Linzbach** (matematikisto).

Pri la vivo de Jakob Linzbach (1873–1953), filo de estona kamparano, parolis akademiano *Ŭlo Lumiste*. *Prof. A. Duliĉenko* klarigis la interlingvistikajn ideojn de Linzbach, pri kiuj li publikigis studojn en diversaj revuoj.<sup>1</sup>

La konferencanoj fondis la *Jakob-Linzbach-Asocion*. La nova organizaĵo havas la celon subteni la integriĝon de diversaj sciencaj disciplinoj, kiujn kultivis aŭ kiujn antaŭvidis la estona matematikisto kaj interlingvisto Jakob Linzbach (temas i.a. pri semiotiko, informadiko, kibernetiko, matematiko, interlingvistiko). Krome eblas kunlaboro kun esploristoj de disciplinoj, kiuj okupiĝas pri la homa cerbo, konscio kaj mensa sano (neŭrologio, psikologio...).

Valoras mencii, ke antaŭ nelonge en Moskvo aperis represo de la baza verko de Linzbach pri lia filozofia lingvo-projekto.<sup>2</sup>

**Informojn donas:** Madis Linnamägi, Estona Interlingvistika Asocio, Pepleri str. 27, EE-51010 Tartu, Estonio; +372 5098647, [forsel@hot.ee](mailto:forsel@hot.ee).

### 3.3 La 19-a konferenco de GIL pri la rolo de elstaraj personoj

La 19-a konferenco de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL) okazis de 27-a ĝis 29-a de novembro 2009 en Berlin. 40 Personoj aŭskultis germanlingvajn prelegojn, kiuj plejparte traktis la rolon de eminentaj personoj por la evoluigo de interlingvistiko:

Prof. Dr. habil. Johannes Klare (Humboldt-Universitato Berlin)

*André Martinet (1908 - 1999) – Grava franca lingvisto kaj interlingvisto de la 20-a jarcento*

Dr. Jürgen Scharnhorst (Berlin)

*Hans Jensen (1884 – 1973) – vivo por la lingvoscienco*

Dr. sc. Detlev Blanke (Berlin, GIL)

*Georg Friedrich Meier (1919-1992) kaj lia rolo por la evoluigo de interlingvistiko en GDR*

---

<sup>1</sup> - Über die Prinzipien einer philosophischen Universalsprache von Jakob Linzbach. – Zeitschrift für Semiotik, 22 (3/4), 2000;

- Jakob Linzbachi filosoofilise keele printsiipidest. Lingvistilise semiootika allikad. – Keel ja Kirjandus, 2000, 1, 25–31;

- O principah filozofskogo jazyka Jakoba Linzbacha (K istokam lingvosemiotiki). – Voprosy jazykoznanija, 1995, 4, 111–122).

<sup>2</sup> - Линцбах, Я. (1916): Принципы философского языка. Опыт точного языкознания. Петроград, 1916;

- 2-a eldono aperis en la Moskva eldonejo KD „LIBROKOM”, 2009, kun la artikolo de Isaac Revzin (О книге Я. Линцбаха „Принципы философского языка. Опыт точного языкознания” el Труды по знаковым системам (Sign Systems Studies), 1965, 2, 339–344. Acta universitatis Tartuensis 181).

Dr. habil. Ilona Koutny (Universitato Poznań)  
*István Szerdahelyi (1924-1987) kaj lia agado por la interlingvistiko*

Dr. habil. Cornelia Mannewitz (Universitato Greifswald)  
*Nikolai J. Marr (1865-1934) - la marismo kaj la problemo de monda lingvo*

Prof. Dr. sc. Velimir Piškorec (Universitato Zagreb) :  
*De Volapük al Spelin. Pri la vivo kaj verko de la kroata instruisto de matematiko kaj planlingvulo Juraj (Georg) Bauer (1848-1900)*

Fritz Wollenberg (Berlin):  
*Adolf Schmidt (1860-1944) – pioniro de la geofiziko kaj de Esperanto kiel literatura figuro*

André Müller (Universitato Leipzig)  
*Planlingvo sub la lumo de komputile subtenita leksikostatistika analizo (ASJP)*

Robert Matthiesen (Universitato Greifswald)  
*Giuseppe Peano (1858-1932) kaj Latino sine flexione*

Prof. Dr. habil. Sabine Fiedler (Universitato Leipzig):  
*Pri la rolo de denaskuloj ene kaj ekstere de la esperanta lingvo-komunumo*

Marek Blahuš, Bc (Masaryk-Universitato Brno)  
*La projekto de genealogio de akademiaj esperantistoj helpe de la interreto*

Benedikt Poller, MA (München)  
*Lydia Zamenhof (1904-1942)*

Ekster la faka programo *Annette Zmyj* prezentis sian projekton de „Leichtlernsprache“ (“linge facil”) sur latinida bazo.

*Sabine Fiedler* krome informis pri nova faka literaturo. Fachliteratur. *Johann Pachter* kaj *Irina Gerassimova* funkciigis la libroservon. *Sebastian Kirf* kaj *Peter Nölle* registris ĉiujn prelegojn sur DVD.

La 20-a konferenco de GIL okazos 26.-28.11.2010, same en Berlin kaj traktos la temon

***“Lingvo-inventado kaj ties celoj”***

## **4 Bibliografioj kaj bibliotekoj**

### **4.1 Elekta bibliografio pri Zamenhof 2000-2008**

*Humphrey Tonkin*

La jaro 2009 pro la 150-jariĝo de la naskiĝo de la iniciatinto de Esperanto estas la „Zamenhof-jaro“. Pro tio observeblas konsiderinda plivigliĝo de prizamenhofaj studoj kaj prelegoj. Por helpi ankaŭ estonte tiajn fakajn aktivaĵojn, jen eltiraĵo el la volumegoj de „International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures“, New York, rezulte de serĉo pri “Zamenhof” por la jaroj 2000-2008. La materialon elprenis Humphrey Tonkin. Mi redaktis la bibliografiojn (aldono de supersignoj, aldono de redaktoroj de antologioj, kursivigo de revuoj kaj antologiaj titoloj, titoloj en revuoj en citiloj

ktp.), tamen pli kompleta prilaboro ne eblis. Do, mi lasis multon laŭ la prezento-kutimoj de la usona bibliografio.

Red.

- Albault, André. 2003. "Ambaŭ Zamenhofaj alfabetoj." En: Irmí Hauptenthal, Reinhard Hauptenthal (red.), *Klaro kaj elasto*, 147-170. Schliengen: Iltis.
- Albault, André. 2003. "Ĉu Zamenhof favoris aŭ kontraŭis NHA-on." *Trefo* 10: 10-11.
- Albault, André. 2003. "La zamenhofa reform-alfabeto de 1894." *Trefo* 9: 4-5.
- Albault, André. 2007 (red.): *Fundamento de Esperanto*. Pisa: Edistudio.
- Albault, André. 2008. "La zamenhofa surogata alfabeto kaj la regulo de Zamenhof." *La Gazeto* 23, no. 3 [135]: 23-24.
- Amis, Joel. 2007. "La Interna Ideo: Ĉu ankoraŭ grava?" *Esperanto USA* 5-6: 8-10.
- Amouroux, Jean, François Degoul. 2006. "La esprimo 'interna ideo'." *Heroldo de Esperanto* 82, no. 6 [2087]: 4-4.
- Amouroux, Jean. 2004. "Centjara jubileo Lidja Zamenhof." *Hirundo* 44: 4-5.
- Amouroux, Jean. 2004. "Ĉu li estis esperantisto?." *Hirundo* 44: 5-5.
- Amouroux, Jean. 2004. "La naskiĝdomo de d-ro Zamenhof en Bjalistoko." *Hirundo* 51: 4-5.
- Amouroux, Jean. 2008. "Nia mistera feino." *La Gazeto* 23, no. 2 [134]: 14-14.
- Amouroux, Jean. 2008. "'Preĝo sub la verda standardo' Inter projektoj kaj cenzuro." *Heroldo de Esperanto* 84, no. 5 [2120]: 4-4.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2007. "Morala devo: Kulturi la memoron." *Heroldo de Esperanto* 83, no. 16 [2114]: 1.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2000. *La familio Zamenhof*. La Chaux-de-Fonds: Literatura Foiro.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2003. "Lidia Zamenhof: La ĉefa verkaro de kaj pri la 'filino de Esperanto'." *Israela Esperantisto* 138: 5-6.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2004. "La familianoj Zamenhof In Memoriam." *Pola Esperantisto* 2: 17-20.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2004. "Libro interesa kaj bezona sed kun signifaj eraroj." *Israela Esperantisto* 141: 12-15.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2004. "Libro interesa kaj bezonata, sed kun signifaj eraroj." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 13 [2060]: 3-3.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2004. "Memore pri Felikso kaj Leono Zamenhof, 1." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 1 [2048]: 3-3.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2004. "Memore pri Felikso kaj Leono Zamenhof, 2." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 2 [2049]: 3-3.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2004. "Pri la juda klerismo kaj Esperanto iom pli vaste, 2." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 35, no. 211: 263-268.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2005. "Ludoviko + Itô = Ludovikito." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 216: 202-206.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2006. "Familio Silbernik: Eminentuloj for de la lumo." *Israela Esperantisto* 144: 3-7.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2006. "Ha-Tikva signifas Espero." *Israela Esperantisto* 145: 9-12.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2006. "Sender Silbernik-la unua apoganto de Esperanto." *Litova Stelo* 16, no. 5 [171]: 12-14.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2006. "Zamenhof-strato aŭ Dobrzyński-sakstrato." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 37, no. 220: 81-89.
- Banet-Fornalowa, Zofia. 2007. "Per demagogio kaj konfuzo ... refuti." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 37, no. 1 [225]: 43-51.
- Behlert, Matthias. 2001. "Kial ne simple noblega homo?" *La Gazeto* 16, no. 4 [94]: 8-10.
- Bergh, Anita. 2003. "Ĉu li estis esperantisto?." *Hirundo* 43: 5-6.
- Blanke, Detlev. 2006. „Zamenhof als Übersetzer“. En: Detlev Blanke, *Interlinguistische Beiträge: Zum Wesen und zur Funktion Internationaler Plansprachen*. (Herausgegeben von Sabine Fiedler) Frankfurt/M: Peter Lang, 315-330.

- Blanke, Detlev. 2005. "Zamenhof als Übersetzer." En: Heidemarie Salevsky (red.): *Kultur, Interpretation, Translation*, 311-328. Frankfurt: Peter Lang.
- Boulton, Marjorie, Danute Statkuvienė. 2004. *Zamenhofas Esperanto autorius Kaunas: Dajalita*.
- Broadribb, Donald. 2001. "Zamenhof kaj la lingvaĵo en Marta." *Esperanto sub la Suda Kruco* 9, no. 4 [52]: 22-23.
- Čeliaskas, Petras. 2001. "L. Zamenhof kaj Litovio." *Litova Stelo* 11; 11; 11; 11, no. 2 [138]; 3 [139]; 4 [140]; 5 [141]: 11-12;.
- Centassi, René, Henri Masson. 2001. *La homo kiu defiis Babelon*. Paris, France: Harmattan.
- Centassi, René, Henri Masson. 2001. *L'Homme qui a défié Babel*. Paris, France: Harmattan.
- Centassi, René, Henri Masson. 2006. *Zmogus, metes issuki Babeliui: Liudvikas Lazaris Zamenhofas/La homo, kiu defiis Babelon: Ludoviko Lazaro Zamenhof*. Vilnius: Mokslo ir Enciklopediju Leidybos Institutas
- Centassi, René, Henri Masson, Louis Christophe Zaleski-Zamenhof. 2007. *El hombre que desafió a Babel*. Madrid: Esperanto-Liceo de Madrid.
- Cherpillod, André. 2007. *Trois rêves humanistes du docteur Zamenhof*. Courgenard: Blanchetière.
- Chiti-Batelli, Andrea. 2000. *Zamenhof Today: Can His Idea of a Universal Lingua Franca Be Revived and Brought up to Date?* Milano: Federazione Esperantista Italiana.
- Corsetti, Renato. 2007. "Ĉi tiu Esperanto estus turka, se oni legus la intencojn de Zamenhof." *Karavelo* 1: 18-20.
- Dambrauskas-Jakstas, Adomas, Petras Čeliaskas. 2002. *Svajotojas: Apybraiza apie esperanto kalbos kurejas Liudvika Zamenhofa*. Kaunas: Varpas.
- Dan, Qisheng. 2000. "Pri la dato de la naskigo de Esperanto." *El Popola Ĉinio* 11, no. 506: 7
- Degoul, Francisko. 2004. "Ĉu nur lingva?" *Heroldo de Esperanto* 80, no. 16 [2063]: 4-4.
- Degoul, Francisko. 2007. "Zamenhof pli kaj pli aktuala." *Heroldo de Esperanto* 83, no. 2 [2100]: 3-3.
- Degoul, François. 2004. "Bahaismo, ĉu religia formo de homaranismo?" *Heroldo de Esperanto* 80, no. 1 [2048]: 3-3.
- Degoul, François. 2005. "Ĉu vere la esperantismo enhavas internan ideon?" *Heroldo de Esperanto* 81, no. 16 [2080]: 4-4.
- Deij, Leen. 2005. "La jida lingvo, PIV, Zamenhof kaj Volfovitsch." *Heroldo de Esperanto* 81, no. 12 [2076]: 3-3.
- Dijk, Ziko van. 2007. "Weltsprache aus Warschau: Ludwig Lazarus Zamenhof, das Esperanto und Osteuropa." *Osteuropa: Zeitschrift für Gegenwartsfragen des Ostens* 57, no. 4: 143-156.
- Dobrzyński, Roman, L. C. Zaleski-Zamenhof. 2003. *La Zamenhof-Strato*. Kaunas, Lithuania: Varpas.
- Dobrzyński, Roman, and L. C. Zaleski-Zamenhof. 2005. *La Zamenhof-Strato*. Kaunas: Varpas.
- Dobrzyński, Roman, L. C. Zaleski-Zamenhof. 2005. *Zamenhofova ulice*. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Dobrzyński, Roman, Dalia Pileckienė, Vilius Sidlauskas. 2004. *Zamenhofo gatve*. Kaunas: Varpas.
- Dobrzyński, Roman, L. C. Zaleski-Zamenhof, Affonso Soares, Ismael Miranda, James Piton, Paūlo Sérgio Vianna. 2006. *A Rua Zamenhof*. Brasília: União Planetária.
- Dobrzyński, Roman, L. C. Zaleski-Zamenhof, István Nemere. 2008. *Zamenhof-utca, Eszperantó utca*. Budapest: Magyarországi Eszperantó Szövetség.
- Dobrzyński, Roman, L. C. Zaleski-Zamenhof, Mall Pärn. 2008. *Zamenhofi tänav*. Tallinn: Eesti Raamat.
- Dobrzyński, Roman. 2004. "Aktualeco de la Zamenhofa penso." *Pola Esperantisto* 6: 168-172.
- Dobrzyński, Roman. 2006. "Eraroj malantaŭ la dorso." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 37, no. 224: 313-329.



- Duc Goninaz, Michel. 2002. "Formiĝo de ideologiaj modeloj pri la rolo de Esperanto." *SAT-Amikaro* 568: 17-19.
- Duliĉenko, Aleksandr. 2003. "Rusaj aŭtoroj en Fundamenta Krestomatio." En: *Cejano*, 1, 14-22. Tartu: Tartua Esperanto-Societo.
- Evstifejev, N. P., A. Skarvan. 2007. Fundamento de Esperanto/Základy mezinárodnej reci esperanto od Dr. Zamenhofa. Partizánske: Espero.
- Fabretto, Lilia, Daniela Quartieron. 2008. Fundamento de Esperanto Isernia: Eva.
- Feificova, M. 2005. "Bjalistoko-urbo plena je zeo-j." *Esperantisto Slovaka* 3: 9-11.
- Fettes, Mark. 2001. "Esenco kaj estonteco-jubilea rigardo." En: Sabine Fiedler, LIU Haitao (red.): *Studoj pri interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. 194-202. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Fettes, Mark. 2003. "'Bistvo En: prihodonost' jubilejne pogled." En: *Mednarodni jezik-realna ali nereala utopija?*, 127-141. Ljubljana: Orbis.
- Figliera, Gian Carlo. 2001. "Zamenhof dubis pri la sukceso de Esperanto." *Eventoj* 218: 2-2.
- Gison, Jeremi. 2002. "La ĉeĥa antaŭulo de Zamenhof." *Israella Esperantisto* 137: 15-19.
- Golden, Bernard. 2007. "Al kiu gento apartenis d-ro L. L. Zamenhof?." *Pola Esperantisto* 1: 18-19.
- Gorecka, Halina. 2008. "Nia trezoro: Fundamenta Krestomatio." *Ondo de Esperanto* 3, no. 161: 18-18.
- Grigorjevskij, Andrej. 2001. "Kion oni respondus al Zamenhof?" *Eventoj* 208: 1-5.
- Grossin, Jacqueline. 2008. "La skribo de Zamenhof." *La Gazeto* 24, no. 1 [139]: 28-28.
- Haĝiev, Dimitar. 2003. "L. L. Zamenhof laŭ du ruslingvaj judaj enciklopedioj." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 203: 156-158.
- Haĝiev, Dimitar. 2004. "Kiu estas la dogmoj de la zamenhofa blinda fervoro?." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 35, no. 212: 289-292.
- Haĝiev, Dimitar. 2005. "Pri la recenzo de Ulica Zamenhofa." *Heroldo de Esperanto* 81, no. 5 [2069]: 4-4.
- Hauptenthal, Reinhard. 2000. "La unuaj libroj de Schleyer (1880) kaj Zamenhof (1887): Pri la lanĉoj de du plan-lingvoj." En: Irmi Hauptenthal, Reinhard Hauptenthal (red.): *De A al B: Festlibro por André Albault*, 97-114. Schliengen: Iltis.
- Hauptenthal, Reinhard. 2000. La unuaj libroj de Schleyer (1880) kaj de Zamenhof (1887): Pri la lanĉo de du plan-lingvoj. Schliengen: Iltis.
- Hauptenthal, Reinhard. 2001. Kurze Mitteilung über die internationale Sprache Esperanto, ins Deutsche übertragen von Wilhelm Heinrich Trompeter. Schliengen: Iltis.
- Hauptenthal, Reinhard. 2005. Über die Startbedingungen zweier Plansprachen: Schleyers Volapük (1879/80) und Zamenhofs Esperanto (1887). Schliengen: Iltis.
- Hauptenthal, Reinhard. 2008. "Nia trezoro: Impona, sed ankoraŭ amatora." *Ondo de Esperanto* 12, no. 170: 21-21.
- Hauptenthal, Reinhard. 2008. "Über die Startbedingungen zweier Plansprachen: Schleyers Volapük (1879/80) und Zamenhofs Esperanto (1887)." En: Irmi Hauptenthal, Reinhard Hauptenthal (red.): *Prälat-Schleyer-Jahrbuch 1*: 55-88.
- Horvath, J. 2006. Az esperantó fundamentuma. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo.
- Huĝimoto, Tacuo. 2008. "Pri kaj ĉirkaŭ Ludovikito." En: Ulrich Lins (red.): *Aziaj kontribuoj al esperantologio*, 33-35. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Itô, Kanzi. 2003. "Ĉu la PVZ estas jam kompletigita?" *Japana eseero*, 3, 55-65. Tokyo: Libroteko Tokio:
- Itô, Kanzi. 2004. Ludovikaj adresaroj 1903-1909. Kyoto: Ludovikito.
- Itô, Kanzi. 2004. Pri nia pvz-ado 1959-2004. Kyoto: Ludovikito.
- Itô, Kanzi. 2004. Spikumajoj, III. Kyoto: Ludovikito.
- Jansen, Wim. 2007. Woordvolgorde in het Esperanto: Normen, taalgebruik en universalialia Utrecht: Landelijke Onderzoekschool Taalwetenschap (LOT).
- Kau, An (Caubel, André). 2005. Nekonato: La Zamenhofa homaranismo. Beauville, France: SAT-Broŝurservo.
- Kendal, Bradley. 2002. "La pola lingvo de Zamenhof." *Monato* 23, no. 11: 20-21.

- Kobayashi, Tsukasa. 2001. "Kio estas Esperanto-movado?" En: *Esperanto en la 21a jarcento*, 309-324. Seoul: Korea Esperanto-Asocio.
- Kobayashi, Tsukasa. 2007. L. L. Zamenhof. Tokyo: Hara shobo.
- Kolker, Boris, Sergej Tyrin, Doron Modan. 2004. "Nekonata artikolo de L. L. Zamenhof." *Israela Esperantisto* 140: 3-9.
- Korĵenkov, Aleksander. 2005. "Historia manuskripto de Zamenhof." *Pola Esperantisto* 6: 15-19.
- Korĵenkov, Aleksander. 2006. "Cent jaroj de la interna ideo." *Ondo de Esperanto* 7, no. 141: 3-4.
- Korĵenkov, Aleksander. 2006. "Nova defio por zamenhofologio." *Ondo de Esperanto* 12, no. 146: 3-3.
- Korĵenkov, Aleksander. 2006. "Nova malnova letero de Ludoviko Zamenhof." *Ondo de Esperanto* 8-9, no. 142-143: 16-19.
- Korĵenkov, Aleksander. 2006. Mi estas homo: Originalaj verkoj de d-ro L. L. Zamenhof Kaliningrad: Sezonoj.
- Kostecki, Marian. 2006. Esperanto verkaro de fratoj Zamenhof. Kraków: Krakova Societo Esperanto.
- Künzli, Andreas. 2006. "De hilelismo al homaranismo ĉe L. L. Zamenhof." *Svisa Esperanto-Societo Informas* 1: 12-22.
- Künzli, Andreas. 2008. "Nia trezoro: Fundamento de Esperanto." *Ondo de Esperanto* 4, no. 162: 21-21.
- Lamberti, Vitaliano, Algimantas Gudaitis, Inga Tulisevskaite. 2002. Vienas balsas visam pasauliui: Leizeris Zamenhofas Esperanto kurejas. Vilnius: Alma littera.
- Lapenna, Ivo. 2001. "La grandeco de d-ro L. L. Zamenhof." En: Carlo Minnaja (red.): *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, 368-372. Copenhagen: Kehlet.
- Lapenna, Ivo. 2007. "La grandeco de d-ro L.L. Zamenhof." *Esperanto USA* 3-4: 19-21.
- Lavarenne, Christian. 2002. "Entretien avec Louis C. Zaleski-Zamenhof." *Monde de l'Espéranto* 537: 6-9.
- Lee, Chong-Yeong. 2001. "Esperantismo kaj homaranismo." En: *Esperanto en la 21a jarcento*, 18-37. Seoul: Korea Esperanto-Asocio.
- Leereveld, Marcel. 2006. "La genio de Zamenhof." *Laŭte* 183: 61-63.
- Liatukaite, Ginta. 2001. "Zamenhof kaj Litovio." *La Gazeto* 16, no. 3 [93]: 7-11.
- Lieberman, E. James. 2000. "Esperanto: Language for Everyone." *Verbatim: The Language Quarterly* 25, no. 4: 21-25.
- Liu, Haitao. 2004. "La lingvistikaj konceptoj de Zamenhof." *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/ Humankybernetik* 45, no. 4: 155-165.
- Maas, Heinz Dieter. 2001. "Esploro de la leksiko de du Esperanto-aŭtoroj." En: Carlo Minnaja (red.): *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, 297-305. Copenhagen, Denmark: Kehlet.
- Mallia, Carmel. 2000. "'La Vojo'." *Fonto* 20, no. 238: 6-10.
- Mallia, Carmel. 2003. "Du ĝemelaj voĉoj: L. L. Zamenhof (1859-1917) kaj Dun Karm (1871-1961)." En: Irmi Hauptenthal, Reinhard Hauptenthal (red.): *Klaro kaj elasto*, 61-70. Schliengen: Iltis,
- Mallia, Karmenu. 2004. Lidja Zamenhof 29.1.1904-2004 Valletta: Malta Esperanto-Societo.
- Mamduhi, Ahmad Reza. 2004. "Zamenhof kaj Ferdousio." *Irana Esperantisto* 3, no. 9: 9.
- Marin, Jean. 2002. "Aktualeco de Zamenhofaj pensoj." *Esperanto* 95, no. 3 [1145]: 56-57.
- Martinelli, Perla. 2004. "Pli fundamentaj ol la aŭtoro de la Fundamento." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 16 [2063]: 4-4.
- Martinelli, Perla. 2005. "Ĉu la antaŭparolo estas parto de la Fundamento?." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 214: 71-74.
- Matthias, Ulrich, Michèle Abada-Simon, Jean Amouroux, Philippe Cousson, Christian

- Lavarenne, Mireille Le Buhan, François Simonnet, György-Miklos Jakubinyi. 2005. *L'Espéranto: Un Nouveaux Latin pour l'Eglise et pour l'humanité* Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo.
- Mattos, Geraldo. 2006. "La ideologio de Esperanto en la originalaj poemoj de ĝia kreinto." En: Amri Wandel (red.): *IKU: Internacia Kongresa Universitato, 59a sesio*, 40-59. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Mattos, Geraldo. 2008. "La ignorata Fundamento." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 39, no. 5 [235]: 234-239.
- Minnaja, Carlo. 2003. "La arto fariĝi centjara." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 203: 116-119.
- Minnaja, Carlo. 2007. "Parola kulturo de Zamenhof al Lapenna." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 38, no. 4 [228]: 214-217.
- Modan, Doron. 2004. "Kion Zamenhof vere diris al la juda delegacio." *Israela Esperantisto* 141: 17-18.
- Modan, Doron. 2005. "Trovia letero de Zamenhof." *Esperanto* 98, no. 1 [1177]: 7-7.
- Modan, Doron. 2006. "La Sunleviĝo de Esperanto." *Israela Esperantisto* 145: 5-9.
- Modan, Doron. 2007. "Kion Zamenhof vere diris al la juda delegacio." *Pola Esperantisto* 1: 17-18.
- Moya Escayola, Giordano. 2001. "Interna ideo de esperantismo en la 21a jarcento." En: *Esperanto en la 21-a jarcento*, 252-259. Seoul: Korea Esperanto-Asocio.
- Nordenstorm, Leif. 2003. *Doktor Zamenhof och det internationella språket: En bok om esperanto och dess upphovsman*. Stockholm: Eldona Societo Esperanto.
- Ó Glaisne, Risteárd. 2004. *Esperanto: Teanga Idirnáisiúnta*. Dublin: Coiscéim.
- Onet, Ionel. 2001. "Kelkajn demandojn." *La Gazeto* 16, no. 4 [94]: 10-10.
- Ošlak, Vinko. 2002. "Zamenhof – la profeto de la justa paco." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 33, no. 196: 60-69.
- Ošlak, Vinko. 2003. "Je imel Zamenhof prav?" En: *Mednarodni jezik-realna ali nerealna utopija?*, 70-106. Ljubljana: Orbis.
- Ošlak, Vinko. 2003. *Mednarodni jezik-realna ali nerealna utopija?* Ljubljana, Slovenia: Orbis.
- Ošlak, Vinko. 2005. "Ĉu Zamenhof pravis?" *Fonto* 25, no. 290: 3-30.
- Ošlak, Vinko. 2005. "La renversita sintagmo, 1." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 213: 10-16.
- Ošlak, Vinko. 2005. "La renversita sintagmo, 3." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 215: 116-125.
- Pessoa, Floriano. 2001. "Kuriozajoj pri la Fundamenta Krestomatio." *Lampiro* 4-6, no. 100: 4-5.
- Pessoa, Floriano. 2007. "Nia instruisto Zamenhof." *Lampiro* 48, no. 118: 7-10.
- Privat, Edmond, Ulrich Lins. 2007. *Vivo de Zamenhof* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Ragnarsson, Baldur. 2007. "La sagaoj kaj Zamenhof: Stabiligaj faktoroj." En: Baldur Ragnarsson: *La lingvo serena*, 683-692. Pisa: Edistudio.
- Robert, L. 2002. "Esperanto kaj la Freinet-pedagogio." *Sennacieca Revuo* 130-131: 12-14.
- Romaniuk, Zbigniew. 2004. "Nekonataj faktoj pri la Zamenhofa familio." *Ondo de Esperanto* 2, no. 112: 14-15.
- Rossi, Nicolino. 2002. "La deka poemo: Ĉu aŭtenta? Jes!" *Heroldo de Esperanto* 78, no. 16 [2028]: 3-3.
- Rossi, Nicolino. 2003. "Esplorvojaĝo tra la originalaj poemoj de L. L. Zamenhof, 1." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 202: 63-68.
- Rossi, Nicolino. 2003. "Esplorvojaĝo tra la originalaj poemoj de L. L. Zamenhof, 2." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 203: 121-125.
- Rossi, Nicolino. 2003. "Esplorvojaĝo tra la originalaj poemoj de L. L. Zamenhof, 3." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 204: 181-184.
- Rossi, Nicolino. 2003. "Esplorvojaĝo tra la originalaj poemoj de L. L. Zamenhof, 4." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 205: 230-234.

- Rossi, Nicolino. 2003. "Esplorvojaĝo tra la originalaj poemoj de L. L. Zamenhof, 5." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 206: 296-301.
- Semer, Josef. 2007. "Zamenhof kaj superjaro." *Israela Esperantisto* Summer 146:12-14.
- Ševčenko, Elena. 2007. Polnyi slovar' esperantskago (meždunarodnogo) jazyka, čast' rusko-esperantskaja/Plena vortaro rusa-internacia Moskva: Impeto.
- Sidorov, Anatoli 2008. "Amiko de Zamenhof: Devjatin-esperantisto de Vilno." *Litova Stelo* 18, no. 2 [180]: 14-19.
- Sidorov, Anatoli 2008. "Amiko de Zamenhof: Devjatin-esperantisto de Vilno." *Litova Stelo* 18, no. 3 [181]: 19-21.
- Sidorov, Anatoli 2008. "Amiko de Zamenhof: Devjatin-esperantisto de Vilno." *Litova Stelo* 18, no. 4 [182]: 19-23.
- Šilas, Vytautas. 2007. "La vojo de Esperanto al Vilno." *Litova Stelo* 17, no. 3 [175]: 7.
- Šilas, Vytautas. 2007. "Perbilda ekskurso tra Esperanto -Vilno." *Litova Stelo* 17, no. 6 [178]: 9-14.
- Silfer, Giorgio, Vinko Ošlak, Kep Enderby. 2004. "Komunikado kaj reprezento, 2." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 35, no. 212: 293-300.
- Silfer, Giorgio. 2001. "Letero al Abraham A. Kofman de la 15-a (28-a) de majo 1901." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 32, no. 190: 60-61.
- Silfer, Giorgio. 2002. "Pravigi sin antaŭ la juda kulturo." *Heroldo de Esperanto* 78, no. 16 [2028]: 3-3.
- Silfer, Giorgio. 2003. "La iniciatoro laŭ la hebrea enciklopedio." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 34, no. 201: 4-6.
- Silfer, Giorgio. 2004. "Komunikado kaj reprezento, 1." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 35, no. 211: 229-233.
- Silfer, Giorgio. 2004. "La jura bazo de la Fundamento." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 16 [2063]: 4-4.
- Silfer, Giorgio. 2005. "La jura bazo de la Fundamento de Esperanto." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 213: 5-9.
- Silfer, Giorgio. 2005. "Popolo de l'libro aŭ libro de l'popolo?." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 217: 228-231.
- Silfer, Giorgio. 2008. "La tago de nia lingvo." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 39, no. 3 [233]: 148-149.
- Skorupski, Jan Stanislaw. 2007. "Zamenhof-pola kuracisto." *Pola Esperantisto* 1: 17-17.
- Słabczyk, Miron. 2004. "Lidja Zamenhof 1904-1942." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 35, no. 207: 38-38.
- Smet, Petro de (red.). 2005. Fundamento de Esperanto Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo.
- Smet, Petro de. 2006. "La unua Zamenhof-monumento de la 21-a jarcento: Dika Pomego." *Monato* 27, no. 7: 18-20.
- Soares, Affonso Borges Galego. 2004. "Centjaro de naskiĝo de Lidja Zamenhof." *Brazila Esperantisto* 96, no. 326: 9-11.
- Sorgi, Paolo. 2004. "Kian socion spegulas la Libro?." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 16 [2063]: 4-4.
- Tonkin, Humphrey. 2000. "The Role of Literary Language in Esperanto." *Interface: Journal of Applied Linguistics/Tijdschrift voor Toegepaste Linguïstiek* 15, no. 1: 11-35.
- Tonkin, Humphrey. 2002. "'La Espero': Esperanto-poetoj pri Esperanto." En: Roy McCoy (red.): *IKU: Internacia Kongresa Universitato, Fortaleza, Brazilo, 3-10 aŭgusto 2002*, 46-67. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Tortel, Jean-Luc. 2007. "Nia kara sed mistera feino." *La Gazeto* 22, no. 6 [132]: 23-26.
- Tortel, Jean Luc. 2005. "Zamenhof kaj medicino." *Sennacieca Revuo* 133: 9-21.
- Uittenbogaard, Ginta. 2001. "Zamenhof kaj Litovio." *La Gazeto* 16, no. 5 [95]: 14-15.
- Verd-Conradi, Gabriel María. 2003. "La nacionalidad y las lenguas de L. L. Zamenhof." En: Irmi Haupenthal, Reinhard Haupenthal (red.): *Klaro kaj elasto*, 273-322. Schliengen: Iltis.

- Viana, Paŭlo Sérgio. 2000. "Pri la 'Fabeloj de Andersen'." *Brazila Esperantisto* 92, no. 312: 15-16.
- Vogt, Horst. 2008. "Ĉu la kvin tezoj de 'Esenco kaj estonteco ...' plu aktualas?." *Ondo de Esperanto* 5, no. 163: 16-18.
- Vries, Arjen-Sjoerd de. 2000. "Eliëzer Ben Jehoeda, een collega van dr. Zamenhof." *Monditaal* 2: 5-6.
- Vries, Arjen-Sjoerd de. 2000. "Eliëzer Ben Jehoeda, een collega van dr. Zamenhof." *Monditaal* 2: 5-6.
- Wildzeiss, Claudia. 2004. "Honore al Lidja Zamenhof." *Heroldo de Esperanto* 80, no. 1 [2048]: 3-3.
- Wüster, Tim Oliver. 2003. "Je bil Zamenhof krivi prerok?." En: *Mednarodni jezik-realna ali nerealna utopija?*, 107-126. Ljubljana, Slovenia: Orbis,
- Zaleski-Zamenhof, Louis C. 2001. "Avo Ludoviko." En: *Esperanto en la 21a jarcento*, 247-251. Seoul: Korea Esperanto-Asocio.
- Zaleski-Zamenhof, Louis Christophe. 2001. "Kelkaj personaj rememoroj." En: Carlo Minnaja (red.): *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, 212-213. Copenhagen, Denmark: Kehlet.
- Zecchin, Armando. 2004. "Kial blinda la fervoro en vere religia zamenhofa himno?." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 35, no. 207: 51-53.
- Zecchin, Armando. 2005. "Distanco pli vorta ol ideologia." *Literatura Foiro: Kultura Revuo en Esperanto* 36, no. 215: 143-145.
- Ziólkowska, Maria. 2005. *Le Docteur Esperanto (1859-1917)* Beauville: Cercle Amical Espérantiste de l'Agenais.

En la Zamenhof-jaro ankaŭ aperis jena grava libro:

Korĵenkov, Aleksander (2009): *Homarano. La vivo, verko kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof* (Serio Scio. Volumo 8). Kaliningrad: Sezonoj, Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 320 p. ISBN 978-609-95087-0-2.

## 4.2 Aktoj de kolokvo pri bibliotekoj kaj arkivoj (Vieno 2007)

*Blanke, Detlev (2009, Red.): Aktoj de la kolokvo „Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj“. 19-a kaj 20-a de oktobro 2007 en Vieno. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 83 p., ISBN 978 92 9017 109 6, prezo: 9,80 €.*

La volumo entenas jenajn kontribuojn:

<i>Detlev Blanke</i>	Antaŭrimarkoj
<i>Herbert Mayer</i>	Tradicia biblioteko kaj novaj defioj: La Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko
<i>Detlev Blanke</i>	Bibliotekoj kaj arkivoj – kelkaj problemoj
<i>Utho Maier / Karl-Heinz Schaeffer</i>	La stato de la 100-jara Germana Esperanto-Biblioteko Aalen en la jaro 2008 – Historio kaj perspektivoj
<i>Christian Cimpa</i>	Modernaj teknikoj en la servo de la Esperantokulturo: Bildarchiv Austria
<i>Árpád Máthé</i>	Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto
<i>Reinhard Haupenthal</i>	La plan-lingvo Volapük en arkivoj kaj bibliotekoj
<i>Miroslav Malovec</i>	Esperanto-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj disponigo de libroj per elektronikigo
<i>Marek Blahuš</i>	Propono pri starigo de interreta superkatalogo kaj cifereca arĥivo de Esperanto-literaturo
<i>Barbara Pietrzak</i>	Esperantlingvaj arkivaĵoj de Pola Radio
Aŭtoroj	

### 4.3 Esperanto-materialoj en British Library

Esperanto-titolojn, kiuj troviĝas en British Library, Londono, oni trovas ĉe:

<http://www.bl.uk/reshelp/findhelplang/esperanto/esperantocollections/esperantocols.html>

<http://www.bl.uk/reshelp/findhelplang/esperanto/esperantoperiodicalsinthebritishlibrary/esperantoperiodicals.html>

### 4.4 Libroj ĉe Google

Laŭ informo de Miroslav Malovec ĉe <http://books.google.cz/> troviĝas katalogo de 10 milionoj libroj el la tuta mondo, inter ili esperantaj.

Oni ekzemple trovas la kompletan anglalingvan verkegon de Geoffrey Sutton pri la originala literaturo en Esperanto ĉe:

[http://books.google.cz/books?id=Z\\_8CG9g2jIC&printsec=frontcover&dq=Concise+Encyklopedia+of+the+Original+Literature+od+Esperanto&ei=9zJnSsTDNpv2ygSTk6ScBA](http://books.google.cz/books?id=Z_8CG9g2jIC&printsec=frontcover&dq=Concise+Encyklopedia+of+the+Original+Literature+od+Esperanto&ei=9zJnSsTDNpv2ygSTk6ScBA)

### 4.5 Worldcat – bibliografia serĉmaŝino

La bibliografia serĉmaŝino Worldcat <http://www.worldcat.org/> ebligas traserĉi katalogojn kaj bibliografiojn laŭ difinitaj vortoj: libroj, studoj, DVD-oj, kompaktdiskoj ktp. Oni ankaŭ trovas aŭtorojn. Verŝajne la maŝino limigas sin al usonaj katalogoj kaj bibliografioj.

Do ĝi ankaŭ estas de certa utilo por interlingvistikaj studoj. Ĝis nun (1.9.2009) Worldcat storis ĉirkaŭ 1,4 milionojn da titoloj. Mi trovis:

(angla)	Interlinguistics	70
(germana)	Interlinguistik	104
(esperanta)	Interlingvistiko	38
(angla)	Esperantology	2
(esperanta)	Esperantologio	80
(germana)	Esperantologie	15
	Esperanto	14 499
(germane)	Plansprachen	62
(angle)	Planned Languages	588

### 4.6 Kelkaj novaj interlingvistikaj verkoj de LIU Haitao

1. Liu, Haitao (2008): Yuyan guanli, yuyanguihua he Shijieyu [Lingva administrado, lingva planado kaj Esperanto]. En: 2007 Beijing Qianyan xueshu luntan [2007, Akademia Forumo de Beijing], la dua volumo. Beijing Normal University Press. p. 117-131.

2. Liu, Haitao (2008): Guojiyüue he Shijieyüue: wenxian gailan [Interlingvistiko kaj esperantologio: dokumenta skizo]. En: 2008 Beijing Qianyan xueshu luntan [2008, Akademia Forumo de Beijing], la dua volumo. Beijing Normal University Press. p. 420-430.

3. Liu, Haitao (2009): La ĉina lingvo kiel interlingvo. En: Kimura Goro Christoph kaj K. Watanabe (red.): Interlingvistiko. Kyoto: Sekaishisosha. p. 173-192. (japanlingva verko, Vidu: <http://www.sekaishisosha.co.jp/cgi-bin/search.cgi?mode=display&code=1425>)

## 5 Leksikografio en la reto

*Kunmetis Miroslav Malovec*

---

En Vikipedio

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-vortaro>

E-vortaro

[http://www.evortaro.ru/index\\_e.shtml](http://www.evortaro.ru/index_e.shtml)

Reta Vortaro

<http://www.reta-vortaro.de/revo/>

Vícejazyčný slovník (Plurlingva vortaro)

<http://www.slovník.cz/>

Vortaro de Josef Hron

<http://www.esperanto.wz.cz/Esp07.htm#Novinka>

Ilustrita Esperanto Vortaro

<http://www.krokodilo.de/vortaro/index.php>

La vortaro Esperanta

<http://pagesperso-orange.fr/la-vortaro/>

Vortaro De / Eo

<http://www.thschuetz.de/vortaro.php>

Akademia vortaro

[http://akademio-de-esperanto.org/akademia\\_vortaro/](http://akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/)

Vortaro-blogo

<http://vortaro-blogo.blogspot.com/>

Hejma Vortaro

<http://www.helsinki.fi/~jslindst/hejmvort.html>

Baza vortaro

<http://www.vessella.it/vortaro.htm>

<http://www.geocities.com/kalblando/vortaro.htm>

Vortaro.info

<http://www.vortaro.info/armixwebengine.php>

Nl /Eo vortaro

<http://vortaro.nl/>

Rata vortaro

<http://esperanto-jeunes.org/ravo/ravo.html>

Esperanta-rusa vortaro

<http://www.esperanto.mv.ru/ESP/vframe.html>

[http://www.esperanto.org.ua/vortaro/v\\_se.htm](http://www.esperanto.org.ua/vortaro/v_se.htm)

STEB - fakaj vortaroj, terminaroj

<http://eventoj.freeweb.hu/steb/vortaroj/index-vortaro.htm>

Wiki-vortaro

<http://eo.wiktionary.org/wiki/vortaro>

Vortaro kun hungara fasado

<http://www.vortaro.hu/mindenesszotar/tar/esper.html>

TEJO La BonEJO vortaro

<http://esperanto.org/tejo/KER/vortaro/e-vortar-enkonduko.html>

Nepali-esperanto-vortaro

<http://nespa.saluton.dk/vortaro>

Portugala-Esperanta vortaro

<http://vortaro.brazilo.org/vtf/>

Ŝerca vortaro

<http://www.geocities.com/Athens/Cyprus/5318/8/Vortludoj.html>

Provizora vortaro Ido-Esperanto

<http://idolinguo.org.uk/idoesp.htm>

Alls Dicionario

[http://www.ophicinadigital.com/alls/av\\_vort.htm](http://www.ophicinadigital.com/alls/av_vort.htm)

Esperanta-litova vortaro

<http://www.esperanto.lt/vortaro.html>

Hektor Alos, Kiril Velkov: Tabuaj vortoj en Esperanto

<http://www.aliaflanko.de/artikloj/text/tabu.html>

Esperanta- kataluna vortaro

[www.esperanto-ct.org/vortaro/vortaro.pdf](http://www.esperanto-ct.org/vortaro/vortaro.pdf)

Wikitravel-vortaro

<http://wikitravel.org/eo/Wikitravel:Vortaro>

Fotografia vortaro

<http://eventoj.freeweb.hu/steb/vortaroj/fotografio/fotografio.htm>

Vortaro-blogo

<http://esperanto-usa.org/en/node/1402>

Universala Vortaro

[http://akademio-de-esperanto.org/fundamento/universala\\_vortaro.html](http://akademio-de-esperanto.org/fundamento/universala_vortaro.html)

Temara vortaro

[http://eo.wikibooks.org/wiki/Temara\\_vortaro](http://eo.wikibooks.org/wiki/Temara_vortaro)

Vortaro de Juna Amika

<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto/vort.htm>



Vortaro de bab.la

<http://eo.bab.la/vortaro/>

Vortaro-blogo

<http://lingvakritiko.com/2008/12/25/vortaro-blogo/>

Castelano-Esperanto

<http://luisguillermo.com/diccionario/>

Vortaro de Bokarev

<http://www.cybercom.net/~dcoffin/bokarev/>

Richardson-vortaro

<http://eeo.8k.com/EoDktA/RichVort.htm>

Bicikla vortaro

[http://vivirenbicicleta.info/art\\_02.eo.html](http://vivirenbicicleta.info/art_02.eo.html)

Granda Esperanta-Rusa vortaro

<http://e-r-vortaro.narod.ru/>

Esperanta Vortaro-Permesilo

<http://espcon.sourceforge.net/main.php?pag=licenca>

Esperanto-eŭska

<http://esperant0.chez-alice.fr/esperant64/esperu0.htm>

Ĉeĥa-esperanta teknika

<http://mujweb.atlas.cz/Veda/traxler/TEKNIKO.htm>

LdP-Esperanta

<http://lingwadeplaneta.info/files/ldpeo.shtml>

Rusa-esperanta medicina

<http://www.skirlet.freesurf.fr/>

Traperko-vortaro

<http://www.traperko.net/?lang=epo>

Genealogia vortaro

[http://worsten.org/vortaroj/genealogia\\_vortaro.htm](http://worsten.org/vortaroj/genealogia_vortaro.htm)

Vortaro Eo-Eo

<http://www.scribd.com/doc/6713629/Vortaro-EO-EO>

Angla vortaro

<http://linguateca.di.uminho.pt/Paulo/DICT/dict-en.html>

Esperanta-germana

[http://www.u-matthias.de/vortaro/eo\\_de.htm](http://www.u-matthias.de/vortaro/eo_de.htm)

## 6 Revuoj

### 6.1 Language Problems & Language Planning 3/2008

En Ipl 68, p. 23-24, ni prezentis la enhavon de LPLP 1+2/2008. Jen sekvas kajero 3:

#### Jarkolekto 32, N-ro 3, Vintro 2008

Language planning for Italian regional languages (dialects) (*Paolo Coluzzi*)

La investigacion del espanol del Suroeste: Problemas y metodos (*A. Marcos Marin*)

International forms of Biblical Hebrew personal names: Their adoption and adaptation in the international planned language Esperanto (*Tsvi Sadan*)

Interlinguistics and Esperanto studies at universities: Experience at the University of Leipzig (*Sabine Fiedler*)

+ 10 Recenzoj, inter ili de Humphrey Tonkin pri Andreas Kuenzli, *Universalaj lingvoj en Svislando*, Federico Gobbo pri Carlo Minnaja, *L'esperanto in Italia* kaj de Sean O Riain pri Detlev Blanke/Jürgen Scharnhorst, *Sprachenpolitik und Sprachkultur*.

### 6.2 Language Problems & Language Planning 1-3/2009

#### La jarkolekto 33, 2009 entenas jenan enhavon:

#### 1/2009

##### Articles / Artículos / Aufsätze / Artikoloj

Re-thinking balanced bilingualism: The impact of globalization in Catalonia  
*Eva Juarros-Daussà and Tilman Lanz*

A sociocultural framework for language, policy and planning  
*Russell Cross*

Irish and Scottish Gaelic – a European Perspective  
*Seán Ó Riain*

New technologies and terminological pressure in lesser-used languages: The Breton Wikipedia  
*Robert Neal Baxter*

##### Reviews / Críticas / Rezensionen / Recenzoj

Wim Jansen. *Woordvolgorde in het Esperanto: Normen, taalgebruik en universalia*.  
Reviewed by *Timothy Reagan*

Francesc Poblet i Feijoo. *El Congrés Universal d'Esperanto de 1909 a Barcelona / La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono*. Reviewed by *Humphrey Tonkin*.

John M. Lipski. *Varieties of Spanish in the United States*. Reviewed by *Frank Nuessel*.

Richard B. Baldauf Jr. and Robert B. Kaplan (eds.). *Language Planning and Policy in Latin America*, Vol. 1. Ecuador, Mexico and Paraguay. Reviewed by *Frank Nuessel*.

Tan Ling Ling, Azlina Musa, Maggie Seaton, Nigel Phillips (eds). *Collins Easy Learning Dictionary: English-Malay Malay-English*. Reviewed by *Jyh Wee Sew*

Rudolf P.G. de Rijk. *Standard Basque, A Progressive Grammar. Volume 1: The Grammar*. Reviewed by *Itziar Laka*

## **2/2009: Special issue: Luxembourg, Edited by Kristine Horner**

Language policy mechanisms and social practices in multilingual Luxembourg  
*Kristine Horner*

The role of World War II in the development of Luxembourgish as a national language  
*Melanie Wagner and Winifred V. Davies*

Constructing luxembourgish ethnicities: Implications for language-in-education policy  
*Jean-Jacques Weber*

Explicit and implicit dimensions of language policy in multilingual banks in L embourg  
*Leilarna Kingsley*

Language identities, ideologies, and policy relevance: Reflections on Luxembourg studies  
*Kathryn A. Davis*

Language policy as experiences  
*Elana Shohamy*

## **3/2009**

### Articles / Articulos / Aufs tze / Artikoloj

Language policy and legislation in post-Soviet Azerbaijan  
*Jala Garibova and Matanat Asgarova*

International languages and education in Botswana and Malawi: A comparative study  
*Gregory Kamwendo, Theophilus Mooko and Tshiamiso Moumakwa*

Wikipedia and lesser-resourced languages  
*Ziko van Dijk*

### Interlinguistics / Interlingu stica / Interlinguistik / Interlingvistiko

Causes of the relative success of Esperanto  
*Detlev Blanke*

### Reviews / Cr ticas / Rezensionen / Recenzoi

Albert Valdman and Iskra Iskrova (eds.). *Haitian Creole-English Bilingual Dictionary*. Reviewed by *Bonnie B. Fonseca-Greber*

David Levey. *Language Change and Variation in Gibraltar*. Reviewed by *Frank Nuessel*

J. César Félix-Brasdefer. Politeness in Mexico and the United States. Reviewed by *Frank Nuessel*

Geoffrey Sutton. Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto. Reviewed by *Esther Schor*

Kendall A. King, Natalie Schilling-Estes, Lyn Fogle, Jia Jackie Lou, and Barbara Soukup. (eds.). Sustaining Linguistic Diversity: Endangered and Minority Languages and Language Varieties. Reviewed by *Timothy Reagan*

Xabier Arzoz (ed.). Respecting Linguistic Diversity in the European Union. Reviewed by *Francis M. Hult*

Guus Extra and Durk Gorter (eds.). Multilingual Europe: Facts and Policies. Reviewed by *Kimura Goro Christoph*

Arika Okrent. In the Land of Invented Languages. Reviewed by *Humphrey Tonkin*

Jon Orman. Language Policy and Nation-Building in Post-Apartheid South Africa. Reviewed by *Timothy Reagan*

Detalojn oni povas trovi che [http://www.benjamins.com/cgi-bin/t\\_seriesview.cgi?series=LPLP](http://www.benjamins.com/cgi-bin/t_seriesview.cgi?series=LPLP)

### **6.3 De LMLP al LPLP – Pri la evoluo de revuo**

*Humphrey Tonkin*

*La Monda Lingvo-Problemo (LMLP)* fondiĝis en 1969, kiam la unua numero aperis ĉe la eldonejo Mouton en Hago. La revuo aperis principe trifoje jare, kvankam oni ne tute sekvis tiun eldonritmon. Oni numerumis la unuopajn kajerojn sinsekve. Komence la revuon redaktis *Victor Sadler*.

Numeroj 1-3 formis Volumon 1 kaj aperis en 1969

Numeroj 4-6 formis Volumon 2 kaj aperis en 1970 (4&5) kaj 1971 (6)

Numeroj 7-9 formis Volumon 3 kaj aperis en 1971

Numeroj 10-12 formis Volumon 4 kaj aperis en 1972

Numeroj 13-15 formis Volumon 5. Numero 13 portas la daton 1973, sed la aliaj aperis tra la venonta du da jaroj, tiel ke Volumo 5 kiel tuto estas prezentita kiel aperinta en 1973-76.

*Richard E. Wood* transprenis la redaktorecon ekde Numero 14.

Numeroj 16-18 formis Volumon 6 kaj aperis en 1977.

En 1977 oni ŝanĝis la titolon de la revuo al *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, sed tiun titolon oni aperigis traduke en pluraj lingvoj ĉe la antaŭa kovrilo de la revuo. Daŭre eldonis ĝin Mouton.

La numerado de la volumoj komenciĝis denove je volumo 1, kvankam ĉe la fronto de la revuo oni klarigis, ke volumo 1 de *LPLP* estis samtempe volumo 7 de *LMLP*. Komence, oni numerumis la kajerojn sinsekve.

Volumo 1 (numeroj 1-3) de *LPLP* aperis en 1977 (1 k 2) kaj 1978 (3)

Volumo 2 (numeroj 4-6) aperis en 1978 (1 k 2) kaj 1979 (3)

Volumo 3 (numeroj 7-9) aperis en 1979

Ekde 1980, la revuo transiris al University of Texas Press (la eldonejo de la Universitato de Teksaso). *Richard Wood* restis kiel Redaktoro. Numeroj ne plu portis sinsekvajn numerojn, kaj la anglalingva titolo *Language Problems and Language Planning* fariĝis la sola oficiala titolo.

Volumo 4 aperis en 1980.

Ekde tiam, ĉiujare aperis nova volumo.

Per numero 1 de Volumo 8 (1984), *Frank Nuessel* ekrolis kiel Vica Redaktoro kaj Recenza Redaktoro.

Numero 2 de Volumo 8 (1984) estis la lasta sub redakto de *Richard Wood*.

Ekde numero 3 de Volumo 8 (1984), *Humphrey Tonkin* fariĝis administra redaktoro, dum *Frank Nuessel* daŭrigis kiel vicredaktoro kaj recenza redaktoro.

Per numero 1 de Volumo 11 (1987), *Karen Johnson-Weiner* aldoniĝis kiel Vica Redaktoro, kaj *Frank Nuessel* restis en sia sama rolo.

Volumo 13 (1989) estis la lasta ĉe la eldonejo University of Texas Press kaj la lasta en kiu *Karen Johnson-Weiner* rolis kiel Vica Redaktoro.

Ekde Volumo 14 (1990), John Benjamins (Amsterdamo) fariĝis eldonanto. *Probal Dasgupta*, *Klaus Schubert* kaj *Humphrey Tonkin* nomiĝis Redaktoroj, kaj *Klaus Schubert* krome transprenis la respondecojn de Administra Redaktoro. *Frank Nuessel* kaj *Klaus Schubert* fariĝis Recenzaj Redaktoroj (Nuessel respondicis pri Norda Ameriko kaj Schubert pri Eŭropo kaj la cetero de la mondo).

Per Volumo 20 (1996), numero 2, *Mark Fettes* aldoniĝis al la redakta teamo kiel Interlingvistika Redaktoro.

Ekde Volumo 22 (1998), *Marc van Oostendorp* anstataŭis *Klaus Schubert* kiel unu el la tri Redaktoroj (ankaŭ kiel Administra Redaktoro), kaj *Renato Corsetti* aldoniĝis kiel Recenza Redaktoro por Eŭropo kaj la cetero de la mondo. La cetero de la teamo restis sama.

Volumo 23 (1999) estis la lasta en kiu *Marc van Oostendorp* funkciis kiel unu el la tri Redaktoroj.

Ekde Volumo 24 (2000), la revuo havis nur du Redaktorojn – *Probal Dasgupta* kaj *Humphrey Tonkin*, kaj *Humphrey Tonkin* reprenis ankaŭ la rolon de Administra Redaktoro.

Ekde Volumo 29 (2005), *Federico Gobbo* anstataŭis *Renato Corsetti* kiel Recenza Redaktoro por Eŭropo kaj la cetero de la mondo.

## **Resumo**

### **Redaktoroj:**

1969-1973 Victor Sadler

1973-1984 Richard Wood

1984- Humphrey Tonkin (Administra Redaktoro 1984-1989; Redaktoro 1990- ; ankaŭ  
Administra Redaktoro 2000- )

1990-1997 Klaus Schubert (ankaŭ Administra Redaktoro kaj Recenza Redaktoro)

1990- Probal Dasgupta

1998-1999 Marc van Oostendorp (ankaŭ Administra Redaktoro)

### **Recenzaj Redaktoroj:**

1984- Frank Nuessel  
1990-1997 Klaus Schubert  
1998-2004 Renato Corsetti  
2005- Federico Gobbo

### **Interlingvistika Redaktoro**

1996- Mark Fettes

### **Eldonanto**

1969-1979 Mouton  
1980-1989 University of Texas Press  
1990- John Benjamins

## **6.4 Esperantologio – Esperanto Studies (EES), Kajero 4 (2009)**

Sub la ĉefredaktoreco de prof. Christer Kiselman aperis la kvara kajero de EES kun jena enhavo:

*Christer Kiselman*     Salutvorto de la redaktoro  
*Christer Kiselman*     A word from the editor  
*Bertilo Wennergren*     Bazformoj de radikoj en vortaroj  
*Gonçalo Neves*         Recenzo pri *Universalaj Lingvoj en Svislando* de Andreas Künzli

Pri tiu ĉi revuo; About this journal

*Christian U. Krägeloh*     Lingva fono kaj uzado de frazstrukturoj en skribita esperanto  
*Natalia Dankova*         Temporality in spoken Esperanto  
*Árpád Rátkai*             Lazar Markoviĉ Zamenhof kaj la Zamenhof-falsaĵaro  
*Petr Chrdle*                Historio kaj planoj de nova Esperanto-Muzeo en Svitavy

## **6.5 Nova revuo pri eŭropa lingvo-politiko**

Ekde 2009 aperadas nova lingvo-politika revuo, kiu traktos lingvopolitikajn problemojn de Eŭropa Unio:

**„*European Journal of Language Policy. Revue européenne de politique linguistique*“.**

La revuo aperos jare per du kajeroj.

Ĝin eldonas:

Liverpool University Press in association with the European Language Council/Conseil Européen pour les langues.

Ĉefredaktoro: Michael Kelly, University of Southampton.

Korespondadreso: Dr. Eleanor Quince, [E.M.Quince@soton.ac.uk](mailto:E.M.Quince@soton.ac.uk)

La jarabono por institucioj: 175 EUR, por individuoj 45 EUR.

Mendojn oni direktu al: Liverpool University Press, 4 Cambridge Street, Liverpool L69 7ZU, telefono: + 44(0) 151 794 2233. fakso: +44(0) 151 794 2235, email: [lup@liverpool.ac.uk](mailto:lup@liverpool.ac.uk), reto: [www.liverpool-unipress.co.uk](http://www.liverpool-unipress.co.uk)

## **La enhavo de la unua kajero (Vol 1, issue 1, Spring 2009):**

*Michael Kelly* Editorial

### Articles

*Michael Kelly*

A third space for Europe: intercultural communication in European language policy

*Angeliki Kiliari*

Language practice in Greece: the effects of European policy on multilingualism

*Karen M. Lauridsen*

National language policies in the era of globalisation: the case of Denmark

*Amanda Hilmarsson-Dunn*

The impact of English on language education policy in Iceland

### Interventions

*Leonard Orban*

From reflection to action

*Wolfgang Mackiewicz* Translation as a strategy for multilingualism

*Anne-Claude Berthoud*

Les enjeux du plurilinguisme pour demain

*Michael Kelly and Eleanor Quince*

Recent EU policy: a digest

*Michael Kelly*

Recent Council of Europe policy: a summary

## **6.6 La esperantologia reta revuo „Lingva Kritiko“**

En IpI 66, p.16, ni prezentis la lastajn artikolojn de „Lingva Kritiko“ (n-roj 26-31)<sup>3</sup>.

Intertempe Bertilo Wennergren aperigis:

- 32 „Bazformoj de radikoj en vortaroj“ (Bertilo Wennergren)  
<http://lingvakritiko.com/2008/04/18/bazformoj-de-radikoj-en-vortaroj/>
- 33 „Noto pri esperantaj radikoj (Ken Miner)  
<http://lingvakritiko.com/2008/06/05/noto-pri-esperantaj-radikoj/>
- 34 „La Oficialaj Aldonoj“ (Bertilo Wennergren)  
<http://lingvakritiko.com/2008/05/13/la-oficialaj-aldonoj/>
- 35 „Noto pri la neceso de signifaj ĝeneraligoj“ (pri la gramatika kategorieco de radikoj, Ken Miner).  
<http://lingvakritiko.com/2008/12/30/noto-pri-la-neceso-de-signifaj-gheneraligoj/>
- 36 „Noto pri la recenzo de Alen Kris“ (Kris kritikis la terminojn uzatajn en la „Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko“ de Bertilo Wennergren; Ken Miner).  
<http://lingvakritiko.com/2008/12/12/noto-pri-la-recenzo-de-alan-kris/>
- 37 „Interesa studo pri Regulo 15“ (atentigo pri studo de Andreas Kück), Bertilo Wennergren.  
<http://lingvakritiko.com/2009/01/17/interesa-studo-pri-regulo-15/>
- 38 „La nova Akademia elpaŝo pri landnomoj“ (Bertilo Wennergren)  
<http://lingvakritiko.com/2009/05/17/la-nova-akademia-elpasho-pri-landnomoj/>
- 39 „Kio estas nova en la Listo de Rekomendataj Landnomoj?“ (Bertilo Wennergren)  
<http://lingvakritiko.com/2009/05/22/kio-estas-nova-en-la-listo-de-rekomendataj-landnomoj/>

<sup>3</sup> La numerojn mi donis, por teni la superrigardon pri la materialo-Red.

- 40 „Kial ne Luksemburgio?“ (Bertilo Wennergren)  
<http://lingvakritiko.com/2009/05/24/kial-ne-luksemburgio/>
- 41 „Noto pri transitiveco: apogo al vortbazita teorio“ (Ken Miner)  
<http://lingvakritiko.com/2009/06/01/noto-pri-transitiveco-apogo-al-vort-bazita-teorio/>
- 42 “Landanoj, gentoj kaj kategorio (Bertilo Wennergren)  
<http://lingvakritiko.com/2009/06/13/landanoj-gentoj-kaj-kategorioj/>

## 7 Pri la projekto „KOD“

En IpI 57, p. 2-5, ni prezentis novan projekton de komunikilo kun la nomo KOD. Ĝi estas konstruata en Germanio. Prilaboras ĝin profesiaj lingvistoj laŭ mendo de la konstru-entreprenisto *Johann Vielberth*, kiu havas multe da mono, sed ne interlingvistikajn sciojn. Ne estas klare, ĉu la bone pagataj lingvistoj vere kredas pri la sukceso de la sistemo. Duboj estas motivitaj, kiel i.a. montras la sekva recenza kontribuo de *d-ro Rudolf-Josef Fischer*.

Red.

### La sistemo KOD – plu antaŭen en la sakstraton

Recenzo de *Rudolf-Josef Fischer*

Vielberth, Johann (in Zusammenarbeit mit Mitarbeitern des eufo-Instituts): Das System KOD. Aktueller Entwicklungsstand. Regensburg 2008. Institut für Entwicklung und Forschung Dr. Vielberth e.K. (Im Selbstverlag). 128 S., ISBN 978-3-9812532-0-7  
(Traduko de la titolo: Vielberth, Johann (kune kun la kunlaborantoj de la Instituto "eufo"): La sistemo KOD: Aktuala evolustato. Regensburg 2008. Instituto por Evoluigo kaj Esploro Dr. Vielberth e.K. (mem eldonita). 128 p. ISBN 978-3-9812532-0-7)

#### 7.1 Enkonduko

La libro<sup>4</sup> jen recenzita estas enhave posta versio de la "blua broŝuro" (Vielberth 2006). Ĝi prezentas la evolustaton de KOD, laŭaserte "internacia komunikada sistemo" (p. 9), kiu estas la solvo de la problemo de mondvasta interkompreniĝo, almenaŭ laŭ la fanfaronaj promeso de ĝia iniciatinto kaj financanto, la industriisto d-ro Johann Vielberth. Sloganoj estis i.a.: "Neniu propra gramatiko", "Ĉiu parolas laŭ sia denaska kutimo", "Sama distanco al ĉiuj lingvoj de la mondo", "Igas lernadon de fremdaj lingvoj superflua".

En mia artikolo (Fischer 2006) mi povis parte kontraŭpruvi, parte malkredindigi tiujn asertojn. Kelkaj prijuĝoj restis malcertaj, ĉar la "blua broŝuro" prisilentis detalojn kaj cetere apenaŭ montris lingvajn ekzemplojn. Kelkpunkte la recenzita libro povas esti rigardata kiel respondo al miaj demandoj. La aŭguritajn problemojn kaj kontraŭdirojn ĝi tamen entute ne solvas, sed male, konfirmas ilin.

En la sekva recenzo mi ne volas ripeti miajn kritikerojn el la artikolo de 2006, sed premisas, ke la leganto konas ĝin. Mi nur pritraktas kelkajn punktojn, pri kiuj la recenzita libro liveras pli detalajn sciojn ol la "blua broŝuro".

#### 7.2 Fonemaro, fonemkombinaj reguloj

La evoluantoj de KOD strekis intertempe la diftongojn /ai/ kaj /au/ el la fonemaro (p. 43ff), por atingi pli facilan eblon, rekonu la strukturon de vortoj de KOD. La gajno ne estas rimarkebla, ĉar sufiksoj, "internaciaj" vortoj (parte kun ne-fonetika prononco!), ktp. plumalebligas ununuran analizon de KOD-vortoj (Fischer 2006, 94f).

#### 7.3 Propra gramatiko

"Propran gramatikon, kun normo de vortordo aŭ fiksa provizo de gramatikaj indikiloj, KOD ne havas." (p. 14) Tiu ĉi jam pli frue prezentita aserto estas misgvida ("gramatiko" estas pli ol

---

<sup>4</sup> Ĉiuj paĝo-indikoj rilatas al la recenzita verko, se ne estas alia eksplicita indiko.



vortordaj reguloj kaj provizo de gramatikaj indikiloj) kaj estus malĝusta eĉ, se oni limigus sin al tiu pli malvasta kompreno de gramatiko.

Laŭdire propra gramatiko mankas, ĉar ĉiu denaska parolanto povu uzi la gramatikajn kategoriojn konatajn el la gepatra lingvo (por plifaciligi la produktadon de tekstoj en KOD). Ĉia sistema limigo de ili tamen estas gramatika regulo en KOD, kaj tiajn oni jes ja trovas: Ekzemple devas German-lingvano rezigni la genron de substantivoj, plie indikojn de kazo post prepozicioj (p. 60). Ĝenerale estas regulo, ne enkodigi nul-morfemojn per markiloj (p. 28). Tiu regulo havas vastajn aplik-eblojn, kaj diversmaniere ne nur laŭ lingvoj, sed ankaŭ laŭ vortoj (ekzemple ĉe sinkretismoj!). La aŭtoroj konscias pri la problemo: la metodo, kiel ili elektis markilojn por certa lingvo, tamen ŝajnas parte arbitra (p. 30ff).

Plian gramatikan regulon de KOD oni prezentas eksplicite en piednoto 35 sur p. 74: "En KOD oni markas la gramatikajn kategoriojn persono, nombro, tempo, aspekto ktp. ĉe la ĉefa verbo." El tio sekvas: parolanto de lingvo, en kiu oni markas tiujn kategoriojn en kunmetitaj verbformoj ĉe la helpverbo, ekzemple la Germana, jen renkontas ion tre fremdan. Temas ne pri vortorda regulo, sed pri preskribita pozicio de gramatikaj vorteroj.

#### **7.4 Strukturo de kunmetaĵoj**

En mia artikolo de 2006 mi jam atentigis, ke oni devas decidi por KOD, ĉu pliprecizigaj informoj staru antaŭ aŭ post la baza morfemo, ekzemple ĉu en la kunmetaĵo "fenestro-niĉo" tiu estu komprenata kiel "niĉo kun fenestro" aŭ "fenestro en niĉo", plie ĉu adjektivo antaŭu aŭ sekvu la rilatan substantivon ktp. Tiu decido estus kontraŭ la aserto, ke ĉiu lingvano trovos sian kutiman strukturon. Kiel oni nun provis solvi tiun dilemon?

Por la adjektivoj oni enkondukis markilon, kiu indikas, ĉu ili staras antaŭ aŭ post la rilata substantivo (p. 61), same la aŭtoroj de KOD videbligas pre- kaj postpoziciojn. Por kunmetaĵoj tamen ne ekzistas solvo. Se laŭ sia lingva kutimo iu produktanto skribas "fenestroniĉo", tiam la ricevanto ne povas scii, ĉu temas pri "niĉo kun fenestro" aŭ "fenestro en niĉo", sen koni la lingvotipon. Laŭ la recenzita libro la kunteksto devas montri tion, aŭ oni ricevas "klarigojn por la legado" (do, temas pri skribitaj kaj ne parolataj tekstoj) kun atentigo pri la lingvotipo (p. 48, precipe piednoto 27). Oni rajtas havi fortajn dubojn, ke tio estas funkcia solvo.

#### **7.5 Teknikaj helpiloj por lingvaj specialistoj**

Sur la paĝoj 18ff evidentiĝas, ke la celo de KOD rimarkeble malvastiĝis kompare kun ĝia komenca evolufazo: tiutempe estis la celo ankoraŭ la interŝanĝo de informoj far ĉiu ajn homo sen lernado de fremdaj lingvoj kaj sen teknikaj helpiloj. Nun la produktanto de KOD-teksto estu sperta denaska parolanto, kiu unue devas lerni, kiuj KOD-markiloj necesas por enkodigi sian propran lingvon (p. 78); la naŭva lingvo-uzanto ne kapablas al tio. Surbaze de tiu scio la produktanto de teksto (ne parolo!) enmetas jen kaj jen komentojn por helpi la komprenon kaj en kazo de nekompleta KOD-vortaro la origina vortformo en la fontolingvo simple restas (p. 21). Krome la enkodiganto uzadas vortarojn kaj manlibron (p. 57f). Okulfrappe tie ĉi ne plu temas pri produktado per parolado, sed ankoraŭ nur per skribado.

Inverse la ricevanto devas unue lerni la lingvolimtransiran parton KOD-Global de KOD (t.e. "oftaj" internaciaj markiloj kaj vortoj) kaj due "KOD-Lingual-Spezial", la parton de KOD, kiu enhavas elementojn, specifajn por la cellingvo (p. 20). Dum tio vortaroj subtenu lin duonaŭtomate, do dialoge (p. 22, p. 68f).

Ekde p. 22 sekvas en la recenzita libro revoj pri teorie ebla perkomputila subteno kun fluskemo sur p. 24, kia ĝi povus esti. Tute aŭtomatan enkodigon la aŭtoroj prave prijuĝas malverŝajna. En tiu direkto ekzistas (almenaŭ ĝis la pretigo de la libro) ankoraŭ nenio preta (p. 63).

#### **7.6 Konkludo**

Entute la recenzita libro estas pli science sobra ol la "blua broŝuro" kaj klare substrekas, ke KOD ne estu lingvo, sed enkodiga sistemo, precipe por la gramatikaj kategorioj de kelkaj elektitaj lingvoj. La strukturaj rompoj en la koncepto de KOD rezultas tamen plue el la celo,

ke KOD-teksto restu parolebla, prononcebla kodaĵo; tial la striktaj reguloj pri fonemkombinoj. Sed la direkto de la nuna evoluo, kiun montras la recenzita libro, estas klare tute alia: la duonaŭtomataj produktado kaj komprenado (p. 84), do per helpo de komputilo (p. 14). Tiu uzo de komputilo estas cetere ja klara kontraŭdiro al la origina promeso de komunikado "sen teknikaj helpiloj" far Vielberth (2003, 11).

Tio tute ne estas nova kaj tial certe spertos la saman sorton de similaj projektoj (vidu Schubert 1990): ekde certa tempopunkto ne plu fluos mono, kaj poste la tuto estos tre rapide forgesita. Entute multegekosta kaj dekomence evitebla sakstrato, se oni antaŭe studus la koncernan fakliteraturon.

## 7.7 Bibliografio

Fischer, Rudolf-Josef (2006): Das Projekt KOD – ein Bericht. En: Detlev Blanke (Red.): *Esperanto heute. Wie aus einem Projekt eine Sprache wurde* (= Interlinguistische Informationen, Beiheft 14) Beiträge der 16. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 1-3. Dezember 2006 in Berlin. Berlin: GIL 2007. p. 91-104.

Schubert, Klaus (1990): Vom theoretischen Entwurf zu praktischen Entscheidungen. Das halbautomatische Übersetzungssystem DLT. En: Bahner, Werner et al. (Red.): *Proceedings of the fourteenth International Congress of linguists*; Berlin/GDR, August 10-August 15, 1987 Berlin. Band 3. S. 2318 – 2320.

Vielberth, Johann (2003): An idea for an International System of Communication. En: Johann Vielberth, Guido Drexel (Red.): *Sprachwissenschaft-Computerlinguistik: Linguistic Cultural Identity and International Communication. Proceedings of the First International Conference on the COD System of Communication*, Munich, Germany, Jan. 25th, 2003. (= Sprachwissenschaft-Computerlinguistik / Linguistics-Computational Linguistics, 16) München. Aq-Verlag. 222 S. S. 9-16.

Vielberth, Johann [2006]: *Das System KOD. Überlegungen zur Idee, Gestaltung und zu Chancen eines sprachübergreifenden Verständigungsmittels*. Regensburg.

## 8 Romaa gramatiko de Nikola Rašić aperis en Zagreb

Du esperantistoj donis gravan kontribuon al la romaa lingvistiko. Fine de decembro 2008 en Zagrebo, Kroatio, aperis la unua Romaa-Kroata kaj Kroata-Romaa vortaro. En la sama volumo aperis ankaŭ la unua kroatlingva prezento de la strukturo de la romaa lingvo, el la plumo de la esperantisto *Nikola Rašić*. Temas pri 44-paĝa studo, kies celo estis prezenti la ĝeneralan strukturon de la romaa lingvo (romani ĉhib) de la dialektoj parolataj en Kroatio – la *arlia* (origine el Makedonio, Kosovo kaj suda Serbio), la *lovara* (origine mezeŭropa: Hungario, Rumanio, Pollando, Aŭstrio k.s.), kaj la *gurbeta* (parolata en Serbio, Montenegro kaj Bosnio, parte ankaŭ en Bulgario, Albanio kaj Rumanio), kaj precipe la *okcidenta gurbeta* (parolata en Bosnio kaj Montenegro). Specialan atenton oni donis al la fonologia aspekto kaj fonologiaj kriterioj de klasifikado de romaaj dialektoj. Poste sekvas prezento de la formoriĉa morfologio de romaaj nominaloj kaj verboj. Fine aldoniĝas tabelita prezento de romaa morfologio el la plumo de alia esperantisto, cetere elstara romaologo, okcitana lingvisto, *d-ro Marcel Courtiade*, profesoro pri romaa lingvistiko en la Universitato Sorbonne en Parizo. Valoregan redaktan laboron faris alia Zagrebano, *d-ro Zoran Lapov*, romaologo kroatdevena de la Universitato de Florenco, Italio. Kompilinto de la vortaro estas *dipl. inĝ. Veljko Kajtazi*, denaska parolanto de la romaa. La vortaron eldonis en luksa kaj bela formo la Orientalisma Fako de la Kroata Filologia societo kaj “Kali Sara”, romaa edukfondaĵo el Zagrebo.

### Bibliografia noto :

**Rašić Nikola:** *Uvod u gramatičku strukturu romskih govora u Hrvatskoj*, p. 345-388 en :

**Courtiaide, Marcel :** *Pregled morfoloških promjena u romskom jeziku*, p. 389-404.

**Kajtazi, Veljko** : *Romano-Kroacijako thaj Kroacijako-Romano Alavari / Romsko-Hrvatski i Hrvatsko-Romski rječnik*, Odjel za orientalistiku Hrvatskoga filološkog društva i «Kali Sara», Udruga za promicanje obrazovanja Roma u Republici Hrvatskoj. Zagreb 2008, p. 411.

## 9 Conlang kaj Conlang-Konferencoj

### 9.1 Pri Conlang ĝenerale

Kiel konate la Interreto ebligas la agadon de multaj homoj, kiuj hobia okupiĝas pri lingvo-kreado aŭ ŝatas ludi per lingvaj eroj. Pligrandiĝas la nombro de tiuj, kiuj klopodas „inventi“ novan lingvon, kion ili nomas en la angla „**constructed languages**“ (konstruitaj lingvoj). En la reto ne nur aperas novaj projektoj, sed ankaŭ informoj kaj materialoj pri multaj malnovaj, eĉ longe forgesitaj sistemoj. La ĉefa lingvo de la conlang-anoj estas la angla. Ili ne nur prezentas sajn projektojn en la reto, malofte ankaŭ en printita formo kiel eldonaĵo, sed ili ankaŭ okazigas konferencojn, kie ili traktas iajn projektojn kaj diskutas diversajn kriteriojn kaj aspektojn de la lingvo-inventado.

Multajn informojn oni trovas ĉe [www.conlang.org](http://www.conlang.org) (1.9.09), la portalo de „Language Creation Society“. La okazigo de konferencoj estas relative nova afero. Pri ili oni skribas en la menciita retejo:

„The Conference is a set of talks and panel discussions about various issues related to language creation, from several different perspectives. It includes both fairly academic linguistic discussions as well as more general sociological ones...“

Ni ankaŭ ekscias, kion ili komprenas sub „lingvo-kreado“:

„Language creation (or "conlanging" -- "conlang" is short for "constructed language") is the process of inventing and (usually) describing a new language. Though the extent to which a language is created varies, creators might include sound systems, grammars, and writing systems for their languages. Some creators are also interested in cosmogenesis: the creation of cultures and worlds in which their languages are used.“

Pri la motivo de la lingvo-kreado oni precizigas:

„People create constructed languages for a number of reasons. Artistic languages are often included in fictional works: for example, Tolkien's **Quenya** in **The Lord of the Rings** or **Klingon** in **Star Trek**. International auxiliary languages (aŭlangs) are intended for communication between people of different native languages, usually to prevent one being elevated over others or to make learning easier; some famous examples are **Esperanto**, **Ido**, and **Interlingua**. Logical and philosophical languages are used to test linguistic (and other) theories; **Loglan** and **Lojban** are well-known examples of the former, and Suzette Haden Elgin's **Láadan** is an example of the latter -- which she incorporated into the **Native Tongue** series of novels.“

La menciitan problemaron oni ankaŭ traktis kadre de kelkaj konferencoj de GIL. La prelegoj aperis en la aktoj de la konferencoj de Gesellschaft für Interlinguistik (GIL). Jen la ĉefaj:

Barandovská-Frank, Věra (2003): „Archiv- und Werkstattseiten für Plansprachen im Internet“. En: Detlev Blanke (red.): *Plansprachen und elektronische Medien. Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. Dezember 2002 in Berlin*. (Interlinguistische Informationen. Beiheft 9.) Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, p. 9-39.

